ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 9

Septembro 2015 Kol.365/31

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Pri UK de 5 membroj 10-a SES Naĝanta ruldometo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Movada foiro sabate antaŭ la inaŭguro de la kongreso en Lillo.
Jen la raportaĵoj de kelkaj busvojaĝaj ĉeestintoj,
laŭ iliaj plaĉaj aŭ malplaĉaj spertoj.

100-a Universala Kongreso en Lillo

(skribas la gvidantino de la busvojaĝo Lenka Angelová):

Post la fino de ĉiuj organizaj taskoj antaŭ la forveturo, inkluzive de la serĉo de kelkaj anstataŭantoj, ni forveturis el Pardubice en la planita horo kaj en bona harmonio. En la aliaj haltejoj albusiĝis pluaj ĉeestontoj de la UK. Bedaŭrinde la ĉeĥa amiko s-ano Václav Kaprál ne povis kunvojaĝi, ĉar li ĵus devis esti forveturigita en malsanulejon.

En la germana urbo Dresden venis al ni la lastaj partoprenontoj kaj en la plena buso ni rapidegis renkonte al la franca urbo Lillo.

Sed la matena Bruselo, kiun ni volis trarigardi survoje, ne bonvenigis nin agrable. Kiam ni fine trovis liberan lokon por parki la buson, la vetero ekpelis nin reen en la buson. Torenta pluvo kun ŝtormo – kion fari? Ni fotis dum la pluvo nur ATOMIUM kaj daŭrigis al Lillo.

En la kongresejo ni registris nin, demetis la objektojn por la vespera foiro kaj forveturis al nia hotelo. Sed tien ni alvenis tro frue kaj la ĉambroj ankoraŭ ne estis preparitaj. Pagado kaj preparo de la ĉambroj daŭris longe (ĝi realiĝis nur danke al perfekta scio de la franca lingvo, kiun regas Jarka Malá), do la plimulto de la ĉeestantoj esploris nian estontan ĉiutagan traceon al la kongresejo. Ĝi postulis 20-30 minutojn da piediro, sed ĉiuj tion bone kapablis aŭ ili elektis taksion. La urban trafikon ni ne povis uzi pro la malproksimeco de la haltejoj.

La Movada Foiro estis por prezento de unuopaj asocioj, ke oni povu montri gazetojn, broŝurojn aŭ verketojn. Aliĝis 130 fakaj aŭ landaj asocioj, ĉiu sidis ĉe sia tablo (80x50cm). La tabloj ne estis preparitaj kaj ni devis serĉi nian tablon kun la numero 115. Kiam ĝi ne estis trovita, ni prenis unu alian kaj jam kuris kun ĝi al la certa loko por prepari ĝin por nia prezentado. Ankoraŭ hejme ni skribe demandis UEA, ĉu malantaŭ la tablo estos ia muro, sur kiu ni povos alglui nian logoon kun la nomo de nia organizaĵo, aŭ ĉu sur la tabloj estos iaj tukoj, sur kiuj ni povus pendigi nian logoon – la oficistino nenion sciis. Do el nia hejmo ni kunprenis 2 stangojn, la logoon kun la nomo AEH ni preparis – presis sur la tolo kaj tiu estis pendigita sur la stangojn, kiuj estis alfiksitaj al la piedoj de la tablo.

Kaj sciu, nia tablo plaĉis al ĉiuj, ni estis bone videblaj kaj ĉefe, sur la tablo estis ankaŭ frandaĵoj por senpage gustumi!! (La magistrato en Pardubice donacis al ni preskaŭ kilogramon da mielkukaj dolĉaĵoj). Ĉe nia tablo haltadis multaj homoj, kiujn ni informis pri nia asocio AEH, pri la urbo Pardubice, kiu subtenis nian vojaĝon kaj pri la belaĵoj kaj interesaĵoj de la Bohemia-moravia regiono.

La solena inaŭguro de la kongreso estis kiel ĉiam belega kaj kortuŝa, la oper-kantistino Anja ravis nin per sia belega voĉo ĉe la kultura almetaĵo. Ĝenis nin nur, ke la plimulto de ni havis enirbiletojn por ĉiuj plej gravaj programeroj en la pli malgranda salono Lapenna, kie estis projekciita rekta dissendo el la ĉefa salono Zamenhof. Tie ne estis loko por la tuta amaso de 2700 partoprenantoj, do ni estis dividitaj

en tri salonoj. Ni spektis la programon sur la ekrano kiel en kinejo. Poste nin vizitis persone s-ano Mark Fettes, la prezidanto de UEA, sed bedaŭrinde ni ne plene ĝuis tiun solenan atmosferon, kiu regis en la ĉefa salono. Tamen niaj aplaŭdoj, kantadoj kaj ĝojo aldoniĝis kaj trapenetris en ĉiujn spacojn de la domego.

Tamen tio havis unu avantaĝon. Ĉe la nacia vespero mi kaŝe iris en la ĉefan salonon, ke mi alĉerpu tiun etoson, sed poste mi ŝate revenis en la "kinejon", kie ni vidis ankaŭ gestajn esprimojn kaj la vizaĝojn de la artistoj, ĉar la kamerao ilin bele filmis kaj projekciis. En la ĉefa salono de granda malproksimeco ili aspektis sur la podio kiel formiketoj.

En Lillo ĉiĉeronis por ni la franca esperantisto Daniel David, multjara amiko de mia panjo. Li gvidis nin tra la plej bela malnova parto de la urbo kaj rakontis al ni ĝian historion. Eĉ malfavora vetero ne deturnis nin kaj la trarigardo danke al la loka spertulo tre plaĉis al ni.

Daniel ankaŭ konsilis al ni la pluan temon de la ekskurso – la urbon Bruĝo, Belgio kaj tie ni antaŭtagmeze lunde enŝipiĝis en du ŝipojn kaj ni navigis tra kanaloj en Bruĝo. La vetero por iom da tempo „saĝiĝis“ kaj

ni havis belan vidon sur historiajn konstruaĵojn de la urbo. Dum mallonga pluvo ni kaŝis nin en la katedralo kaj poste ni plu povis admiri belecojn de Bruĝo. Post la reveno ni denove aŭskultis diversajn prelegojn en la kongresejo laŭ niaj emoj kaj interesoj.

Antaŭvespere kelkaj el ni partoprenis la solenan bankedon, poste en la vespero la balon en la halo Michaux. Ni ne dancis niajn societkutimajn dancojn, sed ni lernis diversajn kolektivajn dancpaŝojn kaj dancludojn ĉe la akompano de muzik-grupo "Kapriol".

Mardan antaŭtagmezon ni promenis tra la urbo Antverpeno. La urbo estas belega, en simila stilo kiel Bruĝo, sed tre granda, do iri de unu belaĵo al la alia postulis de ni pli multe da tempo kaj klopodo. La domo de Rubens kaj liaj pentraĵoj en la katedralo estis por ni rekompenco. La vespera koncerto de la grupo Getch Gaëtano, denove en la kongresejo, estis tre impresa.

La merkredo estas ĉiam kongresa paŭzo, tial oni aranĝas tuttagan ekskurson. Sed la nunjara centa datreveno de la kongreso estis kronita per solena akto en la loko de la unua kongreso en la jaro 1905 en Boulogne-sur-Mer.

Nia buso kun la ĉiĉerono Daniel alveturis en la malnovan parton de la urbo, kiu estis multe ornamita per E-flagoj kaj standardoj kaj ni rapidis al la Placo Zamenhof. Kaj jam venis kantanta pa-

rado florkronita per transparantoj kaj flirt-rubandoj. Post solenaj paroloj kaj salutvortoj de gravaj personoj de la urbo kaj de UEA estis senvualigita nova monumento kun la busto de LLZ kaj ĉiuj partoprenantoj estis invititaj en la urbodomon por plua solena akto. Tie ni ĉiuj (post pluaj solenvortoj) tostis per glaseto da ŝaumvino kaj gustumis la lokan specialaĵon "tapasko".

Post la forveturo el Boulogne ni promenis ĉe la terkabo "Blanka Nazo", sed pro malvarma vento ni nur iom admiris la doverajn blankajn klifojn trans la Kanalo La Manche, iomete trempis niajn lacajn piedojn en la maro kaj volonte sidiĝis en la buson por reveni al nia hotelo. Vespere ni jam povis kanti ĉe gitaro en la manĝejo de nia hotelo.

Ĵaŭde ni vizitis la belgan ĉefurbon Bruselon, admirante la ĉefan grandan placon kaj legende famajn pisantajn knabeton kaj knabineton kaj gustumis la belgajn vaflojn. Tie la vetero favoris al ni, sed male estis en la urbo Gento. Do ni atendis finon de la pluvo en belega katedralo kaj poste ni admiris ĉarmajn urbanajn domojn sur la placo. Lacaj post la trarigardo de du urboj ni ripozis dum la vesperaj koncertoj en la kongrespalaco.

Kiu ne volis la tutan vendredan tagon travivi en la kongresejo, memstare promenis tra la urbo Lillo aŭ kun nia grupeto vizitis la zoologian ĝardenon, kie estas 400 bestoj kaj

eniro senpaga. Blankajn rinocerojn en tiel granda libera spaco povus envii ankaŭ zoo en la urbo Dvůr Králové.

La plej granda salono Zamenhof dum la Internacia artista vespero jam ne estis tiel plena, ĉar sufiĉe da homoj jam forveturis kaj ni povis elekti liberajn sidlokojn. La fino de la vespero apartenis al la koncerto de ĉina esperantistino Eruda LI, kiu estas fondinto kaj prezidanto de Hongkonga-E-Asocio. Ŝi ricevis por ĉinaj popolkantoj en Esperanto grandegan aplaŭdon.

Sabate atendis nin nur la solena fermo de la kongreso, al kiu venis saluti infanoj el multaj landoj, kiuj havis sian "infanan kongreseton".

Ĉe la vojaĝo hejmen ni atendis plenajn aŭtostradojn, pro tio niaj ŝoforoj multe rapidis kaj ni venis en Pragon en tro fruaj, preskaŭ noktaj horoj. Laŭ miaj informoj ĉiuj partoprenintoj atingis sian hejmon en ordo kaj mi esperas, ke belaj rememoroj de la tuta vojaĝo transkovros la malpli feliĉan finon de la vojaĝo.

Lenka Angelová

Kontribuo kaj rememoro pri la UK en Lillo de Jana Křížková

La planita ekskurso al memorindaĵoj en Bruselo la unuan tagon de nia vojaĝo ne povis esti realigita pro akra ventego, pluvo kaj malvarmo, sed ni feliĉe venis en la urbon Lillo. En la hotelo ni devis iomete atendi, la ĉambretoj ankoraŭ ne estis preparitaj. La

ĉambreto estis bela, sed sen ia ŝranko, nur kun kvin vestportiloj sur stangetoj fiksitaj en la muro. Ni devis alkutimiĝi je tia simpla tranoktado. Sed ĝojigis nin, ke al ĉiu ĉambreto apartenis lavujo, duŝo kaj necesejo, krom tio ni povis en la ĉambreto kuiri kafon aŭ teon.

La Movada Foiro

Ĝojigis nin, ke nia tablo inter eble 130 aliaj estis por kongresanoj interesa kaj ni povis rakonti al kongresanoj pri nia organizaĵo, pri nia urbo kaj la homoj admiris kaj povis gustumi eĉ specialaĵon - mielkukon de la urbo Pardubice. Ĉar ni alterne deĵoris ĉe nia tablo, ni povis rigardi ankaŭ aliajn tablojn – allogaj estis koreanoj, kiuj disdonis verdajn tuketojn kun la dato de la 102-a UK, kiu okazos en Seulo. Ankaŭ niaj slovakaj esperantistoj havis tre belajn propagandajn materialojn pri la venonta UK en Nitro.

Busekskursoj

Ili okazis laŭ la plano – Lillo, Bruggy, Antverpeno, Boulogne sur Mer, Gento kaj en pli bela vetero denove Bruselo. Ankoraŭ en la buso ni ricevis informojn pri tiuj ĉi urboj kun mapetoj en la ĉeĥa kaj Esperanto. Dankon al redaktorino Jarmila kaj Josefo, kiuj preparis la materialon.

Boulogne-sur-Mer

Kortuŝa renkontiĝo de esperantistoj sur la loko, kie en la jaro 1905 parolis L.L.Zamenhof. Tiam okazis la 1-a UK. Komune estis senvualigita antaŭ la stacidomo monumento omaĝe de L. L. Zamenhof kaj poste ni estis invititaj de la urbestro en la urbodomon.

Preskaŭ 400 personoj ricevis glaseton da ĉampano kaj peceton pro manĝi. Ĉar ni iomete malfruis, ne restis jam tempo por promeni tra la urbo, ni daŭrigis al la rivero Liana kaj al la haveno. Poste ni nur komune fotografis nin antaŭ la monumento de viktimoj el la urbo de ne nur ambaŭ mondmilitoj.

Plu ni veturis tra vilaĝeto kun tipaj, tre interesaj dometoj ĝis la loko, kie staras 53

metrojn alta kolono, konstruita por memoro de la Granda armeo de Napoleono. Ni devis vesti mantelojn, ĉar la vento estis fakte tre forta. Kun intereso ni rigardis la Kanalon La Manche kaj doverajn blankajn klifojn de la angla marbordo. Post kelkaj kilometroj ni haltis en bela vilaĝeto kaj hardiĝemuloj almenaŭ en la marakvo trempis la piedojn kaj kolektis interesajn konkojn por la memoro. Nacia programo en la kongresejo okazis en la formo de kabareto.

Kio ĝojigis min dum la kongreso?

Ekzemple tio, ke mi povis propraokule vidi kaj la nepon de LLZ kaj la anglan verkistinon Marjorie Boulton, kiu multe verkis en Esperanto; ke mi povis renkonti la prezidanton de UEA M. Fettes kaj aŭskulti liajn interesajn parolojn, partopreni la paroligajn kursojn kaj informiĝi pri la disvastigo de Esperanto en afrikaj landoj. Mi estis informita, kiel estis konstruita la submara EŬROTUNELO La Manche. Agrable estis partopreni diversajn koncertojn kaj ankaŭ la aŭkcion gvidatan de H. Tonkin, kiu plaĉis al ĉiuj.

Mi renkontis multajn miajn geamikojn kaj korespondantojn. Kortuŝa estis la renkontiĝo kun estimata urbanino de la urbo Boulogne, kiu estas nun 89-jaraĝa, ĉe kiu mi antaŭ 24 jaroj loĝis okaze de la kongreso de francaj esperantistoj.
Mi jam antaŭĝojas la 101-an UK-on en Slovakujo, en la urbo Nitro.

Mia unua Universala Kongreso

el la plumo de Jarka Malá

Buse ni atingis la urbon Lillo, kie estis okazonta la 100-a Universala Kongreso. Ni alveturis frue, pro tio mi ne supozis renkontiĝi kun multe da partoprenantoj. Sed kia surprizo atendis min! Ĝuste en la enirejo staris mia belga amiko Marc Cuffez. Mi atendis en la vico de aliĝantoj, tie jam la dua persono –

franca partoprenantino de Somera Esperanto-Studado, Suzanne ekvidis min kaj ornamis min per nomŝildo. Kiel mi fieris pri la tri premioj de Nicola Ruggiero (mia ĉi-jara instruisto de literaturo dum SES en la slovaka urbo Martin)! Kiel mi ĝuis la kantadon de granda grupo, en kiu partoprenis mia slovaka amikino Anička! Ho, ĉie estas konatoj…

Ankaŭ poste mi konatiĝis kun la afablaj francaj geedzoj Monique kaj Pierrot, kun nia gaja saksa amikino Helga, kiu rapide eniĝis en nian ĉeĥan grupon en la buso. Mi ekkonis dum la instruado la famajn Katalin Kovats, Sylvain Lelarge kaj aliajn famajn personojn. Mi rekte aŭskultis Marjorie Boulton, anglan poetinon. Finfine mi per miaj propraj okuloj alrigardis la estraron de UEA. Multajn novaĵojn mi eksciis dum la UK…
La plej grandan surprizon mi travivis ĉe la interparolo kun Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, rekta posteulo – nepo de la fondinto de nia komuna lingvo L. L. Zamenhof. Lia sanstato ne permesas multe da movo, sed tamen li ĉeestis ĉiujn ceremoniojn.

La krono de nia kongreso estis fianĉiĝo de du slovakaj membroj de nia movado: Petro Baláž kaj Dorotka Rodzianko. Ni ĉiuj estis kortuŝitaj. Neniel pli grave povus finiĝi nia mond-renkontiĝo – atenteme ni sekvos la preparon de la 101-a Universala Kongreso en Slovakio en 2016.

Jindřiška Drahotová: **Kiel mi vidis la kongreson**

Estas facile skribi, ke okazis Universala kongreso en la lando de la unua kongreso, sed ne estas facile priskribi la larĝecon de impresoj, travivaĵoj, sentoj, okazaĵoj, des pli, ke la homa rememoro saltetas de unu al aliaj ra-

pide kiel birdeto. Laŭ psikologia eldiro, kiu en iu lernolibro estis skribita: „La homo forgesas, kio estis dirita, sed tenas en sia memoro la manieron kaj impreson, kiel la vortoj estis diritaj“. Ankaŭ por mi restas miaj personaj rememoroj same kaj grave. Ĉiuj homoj alportis en la kongresejon pozitivajn ideojn, etoson, ĝuon.
Konsternis min la amaso da budoj, kie esperantistoj el multaj landoj prezentis sian agadon, la plej granda salono estis plenplena, vigla. Min alparolis kaj kortuŝis la vortoj de estraranoj, precipe de la prezidanto Mark Fettes, kiu parolis pri tradicio, kiun la junularo povas trovi iel malmoda, tamen post jaroj li mem trovas la ĉiam saman manieron de la organizado tre bona.

Nekredeble agrablaj estis por mi la renkontiĝoj kun amikoj el Japanio, Latvio, Litovio, Rusio, Svedio, Germanio kaj nombraj francoj, sed ankaŭ renkontiĝoj kaj interparoloj kun nekonataj esperantistoj. Mi ne sukcesis partopreni ĉiujn por mi gravajn prelegojn, teatraĵojn, koncertojn ... simple pro manko de tempo. Sed tiuj, kiujn mi povis aŭdi, estis tre interesaj – pri artefarita inteligenteco, pri orienta medicino, pri la planoj por rapida kurso de kuracistoj de urĝa medicino, pri kuracado de nefekundeco, pri ATEO.

Dum la prelego de EEU estis prezentita Eŭropa himno en Esperanto kaj ĉiuj himnoj de ŝtatoj de EU en naciaj lingvoj, pri sukcesoj de *lernu.net* kaj *edukado.net*, duolingo kaj aliaj, mi admiris instruadon en salono, kie pro la amaso de interesiĝantoj la pordon oni devis fermi, ĉar homoj estis densege amasiĝintaj; mi estis ravita pro la rakonto de la geedzoj Robineau pri la vojo al Santiago de Compostela, mi vidis, kiel Renato Corsetti penas por agado en „landoj de la tria mondo“ kaj mi eksciis, kiom multe da laboro kaj defioj staras antaŭ ni...
Ne estis por mi mirige, ke mia amikino, nur kelkmonata komencantino, ĝuis la kongreson, ĉar Esperanto mem estas mirindaĵo!
Vivu la sekva kongreso en Nitra, glora estu la etoso, kiun kreas slovakoj kun Peter Balaž en la frunto!

Eble povas iu opinii pri mia rakonto, ke ĝi estas tro subjektiva. Prave. Ĉar pri nia senzorgeco pro vojaĝo, loĝado, ekskursoj, komplete ĉio ... zorgis la "anĝelo" Lenka.
Ankaŭ Ludoviko mem aranĝis por sia omaĝo en Boulogne-sur-Mer bonan veteron.

Karel Votoček: **La fino kronis nian aventuron**

Longtempe mi ĝojatendis la ĉi-jaran UK-on, ĉar dum la pasintaj 3 jaroj mi ne partoprenis similan aranĝon. Kompreneble mi ankaŭ ĝojis denove ekvidi miajn ĉeĥajn geamikojn, kiujn mi malofte vidas, ĉar mi fakte ne tro ofte partoprenadas la E-renkontiĝojn.

Vendrede vespere ni forveturis el la ardanta Prago en bona humoro. Nur en Germanio venis nuboj kaj iom da pluvo. Ankaŭ trarigardo de Bruselo devis esti prokrastita, ĉar la vento kaj pluvo plifortiĝis.

Nur poste la vetero "saĝiĝis", kvankam dum la tuta semajno ankoraŭ kelkfoje pluvis. Sed por ni en la kongresejo tio ne tro gravis. Spektante diversajn koncertojn aŭ teatraĵojn mi renkontis proksimume 110 samideanojn, kun kiuj estis ĉiam io priparolinda.
Plej multe kortuŝis min la teatraĵo „Ursula“ pri la vivosorto de Ursula Grattapaglia, la fama fondinto de la brazila „Bona Espero“. Same en okuloj de mia amikino aperis larmoj, kiam Ursula rakontis pri siaj militaj travivaĵoj.
KAJTO kantis novajn kantojn, tamen ili ĝojigis min per siaj malnovaj kantoj, kiujn mi konis. Ankaŭ la aliaj muzikgrupoj estis plaĉe aŭskulteblaj.
El la urba turo mi observis la tutan urbon kaj la ĉirkaŭaĵon, ĉar la aero estis post la pluvo pura. La stratoj estis plenplenaj de aŭtoj, certe Prago post kelkaj jaroj aspektos same. Eĉ dum la labortagoj mi vidis nur malmulte da liberaj lokoj por parkado de aŭtoj. Verŝajne kiam iu forveturos, tuj venos al la libera loko iu plua.
Sed ĉio devas finiĝi. Sabate posttagmeze estis planita la forveturo por esti en Ĉeĥio dimanĉe antaŭtagmeze. Sed niaj ŝoforoj asertis, ke laŭ siaj reguloj

ili povas veturi nur 20 horojn seninterrompe, do se ni foriros tagmeze, tiam necesas fini la vojon ĝis la 8-a horo venonttage. La solena fermo finiĝis ĉirkaŭ la 13-a horo. Tiam ni povis trankvile forveturi kaj fini la vojon ĝis la 9-a horo matene. Tamen post enbusiĝo oni sciigis al ni, ke la ŝoforoj komencis sian ekveturon jam je la 10-a horo, tial necesas hasti por veni hejmen ĝustatempe. Al niaj ĝentilaj demandoj, kial ili ekveturis tiom frue, ni ne ricevis respondon kaj la demandantoj estis nomitaj „kreantoj de malbona humoro“.
Al Prago ni venis je la 2-a horo nokte. Se ni supozus veni tiom maloportune, tiam ni emus almenaŭ halti en alia loko pli proksime al la centro. Sed la ŝoforo indiferente pasis la tramhaltejon kaj veturigis nin ĝis la fino de la urbo, kie kompreneble regis plena silento. Eĉ la rekomendataj taksioj tie ne aperis. Tial necesis atendi duonhoron antaŭ ol venis nokta buso, kiu veturigis nin reen al la tramhaltejo, kiun ni antaŭe pasis. Feliĉe la plua vojo okazis jam sen problemoj. Tamen restis amara rememoro al la fino de la busekskurso. Mi esperas, ke venontokaze la estrino sukcesos elekti pli komplezajn ŝoforojn.

Noto de la redakcio: La gvidantino Lenka klopodis persvadi la ŝoforojn halti ekzemple ĉe la ĉefstacidomo en Prago, ke la homoj el diversaj ĉeĥaj urboj havu pli bonan trajnligon, sed ŝi ne sukcesis. Ili ankaŭ rifuzis ĉe la reveno halti aŭ almenaŭ ĉirkaŭveturi tra la Rhein-valo por vidi kelkajn burgojn kaj kastelojn. Tamen Lenka ricevis multajn leterojn, ke ŝi pro malbona konduto de la ŝoforoj ne estu malgaja, ja la tuta vojaĝo estis belega kaj al ŝi apartenas multaj dankoj.

Noto de Margit Turková: Ĉio bone finiĝis, mi atingis mian hejmon senprobleme. Tamen kelkaj ceteraj havis problemojn.

Fotoj de diversaj kongresanoj:

1) movada foiro: budo de AEH
2) ni antaŭ la buso
3) Liba Dvořáková – salutvortoj nome de la Ĉeĥa respubliko
4) grupeto ĉe la afiŝo
5) ĉe la busto de LLZ antaŭ senvualigo (DE, Kongo, CZ)

6) nia grupo en la ŝipo
7) jam venas kantanta parado kun flagoj (Boulogne)
8) senvualigo de la busto LLZ
9) invito en la urbodomon
10) ni ripozas
11) nia grupeto estis en zoo
12) vizito de infanoj el ilia kongreseto
13) ni antaŭ la monumento de mondmilitoj
14) meze la angla poetino M.Boulton
15) Jana kun 89-j. amikino
16) Jarka kun sia franca amiko
17) antaŭ rendevua tabulo en la kongresejo
18) la nepo de LLZ
19) ekskurso en la pluvo
20) tosto - spite de la ŝofor-problemo ni en bona ordo revenis hejmen.

Naĝanta ruldometo

Pasigi siajn somerajn feriojn ĉe la akvo aŭ eĉ sur ĝi, do ĉe lago aŭ ĉe la maro estas prefero de plej multaj homoj. Multaj homoj deziras esti en laŭeble natura medio kaj ili laŭ siaj financaj eblecoj ŝatas pasigi sian ferian restadon en tendoj, en kabanoj, en ruldometoj aŭ en boatoj. Nun germana industri-dezajnisto el la plej norda urbo de Germanio KIEL konstruis ruldometon, kiu estas uzebla ankaŭ sur la akvo. Kaj tio ne estas nur amatoraĵo, sed la produkto preta por merkato.

La kvar metrojn longa ruldometo estas apenaŭ distingebla de la tradicia veturilo. La sola distingaĵo estas la fakto, ke ĝi nun ne staras sur herbejo de kampadejo, sed ke ĝi naĝumas en la akvo de nordgermana lago. Nur la flanka enirpordo mankas ĉe tiu ruldometo. La pordo anstataŭe leviĝas supren ĉe la antaŭa flanko.

Nun post pluraj disvolvaj fazoj la naĝanta ruldometo kun la nomo "Sealander" estas preta por seria produktado. La plej granda defio estis samtempe plenumi la postulojn de ruldometo kaj de boato. Ekzemple la algluiĝo de la glacoj devas esti tiom hermetika, ke la mara salo ne povas enpenetri. La duoblaj aprobaj procedoj por la Sealander rabis multe da tempo. Nun finfine la veturilo ricevis ĉiujn necesajn kontrolsigelojn kaj aprobojn.

La interno donas lokon al kvar personoj sur du vidalvidaj sidbenkoj. Troviĝas malgranda tablo, kuireja niĉo, kampadeja necesejo kaj ŝrankoj. Laŭbezone la du benkoj konvertiĝas al kuŝareo je grandeco de 200 oble 156 centimetroj do - do ĉio kiel ĉe normala ruldometo. Nekutima estas ankaŭ la konstruo de la malantaŭa parto: Tie la tegmento estas rulebla ĝis la mezo de la ruldometo, kiu tiel ne nur kapablas naĝumi, sed ankaŭ taŭgas kiel kabrioleto.
Por la surakva moviĝo ĉe la malantaŭa parto fiksiĝas elektra boatmotoro. Necesas nur du manipuloj kaj la ekstera motoro estas ŝraŭbe fiksita kaj la Sealander povas ekveturi surakve. La kapitano de la naĝanta unuĉambra loĝejo ne bezonas kondukpermeson por boatoj, se la motoro ne superas 15 ĉevalpovojn (11,1 kW).

La amfibia veturilo, kiu estas preskaŭ plene produktata en Germanio, havas prezon, kiu korespondas al ĝiaj apartaj ecoj: La baza varianto kostas 17.990 eŭrojn, la malgranda versio de la motoro kostas krome 1849 eŭrojn. Kiu krome mendas kelkajn akcesoraĵojn, tiu bone pagas pli ol 20.000 eŭrojn. Tio ja estas konsiderinda sumo, sed se oni aĉetus ruldometon kaj boaton separe, oni verŝajne devus pagi ankoraŭ pli.

El E-retradio

DUOBLAN INFORMILON Vi nun ricevas anstataŭ suplemento Antaŭen pro granda raportaĵo el UK Lillo. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.